

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 15 fkoj
Bonfara : 20 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO - JUNIO

1974 3

KULTURAJ KAJEROJ

1974 MAJO - JUNIO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

La ora epoko de Hamburgo M. Turin

Sekreto de la enderma arto

Mono. Ĝia naskiĝo

Mistera ekskurso

Incendio Bukar

Por via distro

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

La aliĝoj por la someraj periodoj alvenas regule sed malrapide kaj la nombro da aliĝintoj nuntempe, komence de junio, ankoraŭ ne estas kontentiga. Ni tamen esperas, ke ĝi fariĝos tia, iom post iom, ĉe la fino de la monato. Ne ĉiuj francaj gesamideanoj iros eksterlanden. Do, kie ili povos renkonti geesperantistojn ? Pripensu. Pripensu ankaŭ la amikoj, kiuj loĝas trans niaj limoj. La suno en Grésillon estas multe pli agrabla ol en iu ajn alia loko !

De post la Printempa Renkontiĝo, pri kiu ni parolis en la lasta numero de la revuo, la kastelo ne tute reendormiĝis. De tempo al tempo ĝi eĉ tute eldormiĝas por du aŭ tri tagoj. Jam dum la Paskaj tagoj, kun granda plezuro, ni akceptis karavanon de 75 italaj gesamideanoj de Treviso kaj Padovo. Ili ĝuis la restadon kaj la organizitajn ekskursojn. Ili foriris matene kun malvarma mangxo kaj revenis vespere por la vespermangxo kaj poste, la distrajoj. Ĉu tia programo ne plaĉus al via grupo ? Ĉu vi ne povus organizi tian vojaĝon por la membroj de via grupo kaj iliaj amikoj ? Eble pluraj grupoj de pli malpli najbaraj urboj povus partopreni la vojaĝon. Eble vi povus fari similan proponon al grupoj eĉ neesperantistaj sed simpatiantaj. Vi havas tempon por prizorgi la aferon ĉar la plej taŭgaj monatoj estas aprilo, majo, junio, septembro kaj ĝis la mezo de oktobro. Ni helpos vin kompreneble. Nur petu informojn pri prezoj kaj programoj. Kial ĉiujare, dum Pentekosto okazas en Grésillon duonlabora, duonekskursa, renkontiĝo de germana kaj franca popolaj universitatoj, nun de pli ol dek jaroj ? Okazigu tian stud - aŭ ekskursperiodon kaj vi povos, poste, mem doni la respondon.

Ĝis baldaŭ.

Por plezurigi vin aŭ la aliajn

okaze de la finjaraj festoj

CENTJARDAŬRA
ESPERANTA KALENDARO

Eleganta sur via skribotablo
Praktika en la uzado
ebligas trovi iujn ajn datojn de la jaro 1900 ĝis la jaro 2000

dimensioj : 10,5 × 16 cm.

Prezo : 50,00 fr. fr. + 10 % por afranko



Esperanto tra la Mondo ★

EMINENTA ESPERANTISTO MORTIS

La 24an de Aprilo 1974, mortis la federacia prezidento de Aŭstrio Franz Jonas.

Li naskiĝis en laborista familio, lernis la metion de kompostisto, kaj kiel ano de la socialista partio, urbestro de Vieno, atingis fine la plej altan postenon en sia lando. Aktiva esperantisto, li restis ĉiam fidela al nia movado kaj ĉiam laŭeble helpis ĝin publike.

LA AGADO DE T.E.J.O.

— La Eŭropa Junulara Fondaĵo el Strasburgo ankaŭ ĉi-jare subvencios la agadon de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (T.E.J.O.), la junulara sekcio de U.E.A. Por 1974, T.E.J.O. ricevos subvencion de 17 000 francaj frankoj, ĉefe pro la intensa kaj bona laboro de ĝia komisiono por eksteraj rilatoj kiu aranĝas seminariojn kaj renkontojn kun neesperantistaj junularaj organizoj pri lingvistikaj temoj, kiel, ekzemple, la konferenco pri la estonto de la kulturoj kaj lingvoj eŭropaj, en Zierenberg, fine de la lasta jaro.

— Krom la eldonado de la ĉiam interesa gazeto « Kontakto », T.E.J.O. kunvenigas la junajn esperantistojn ĉiujare (en 1974 en Münster, inter la 4a kaj la 10a de Aŭgusto, pri la temo : « Junularo kaj edukado »). T.E.J.O. eldonas regule broŝurojn en pluraj lingvoj, ĉefe pri la aspektoj de la lingva imperialismo kaj havas kontaktojn kun la asocioj kiuj interesiĝas pri la lingvaj minoritatoj, pri la volontula servo kaj pri la « tria mondo ».

— Unesko invitis T.E.J.O. kontribui al sia publikaĵo pri starpuktoj de junaj homoj pri pacproblemoj. T.E.J.O. prezentis referaĵon pri kultura kaj lingva imperialismo.

— Estus dezirinde ke ĉiuj gejunuloj de nia movado partoprenu la vivon kaj interesajn strecojn de T.E.J.O.

« JUNA AMIKO », SUBTENINDA INTERNACIA LERNEJA REVUO

La esperantistoj kiuj gvidis kursojn, ekzemple en liceoj, ofte plendis pro manko de taŭga revuo por la « adoleskeca » aĝo, kiu ne povas ankoraŭ interesiĝi pri gazeto kiel « kontakto ».

Nun, tia gazeto ekzistas. Temas pri « Juna Amiko », eldonita en Hungario, kun internacia redaktaro sed tiu gazeto bezonegas la intereson kaj subtenon de ĉiuj interesatoj. Estus bedaŭrinde ke tia iniciativo ne ricevu la merititan helpon.

LABORPLANO DE U.E.A. OKAZE DE LA JARDEKO DE U.N. KAJ UNESKO KONTRAŬ RASISMO

La komitato de U.E.A., dum la universala kongreso de Hamburgo, diskutos pri la projekto de laborplano preparita de la estraro, en kunligo kun U.N. kaj Unesko, pri la jardeko de aktivado por kontraŭbatali rasismon kaj rasan diskriminacion. U.E.A. dediĉos specialan atenton al la lingvaj diskriminaciaj problemoj, notinde al intensigo de agadoj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, aranĝita de la esperanto-organismoj de U.E.A., ĉiujare en Februaro.

BROŜURO « POR PLI EFIKA INFORMADO »

La informa fako de U.E.A. eldonis kiel 20-paĝa ilustrita broŝuro, la artikolserion de Prof. Lapenna, unue publikigita en la revuo « Esperanto », dediĉitan al la multaj aspektoj de la informado de la publiko pri la internacia lingvo.

Estus bone ke ĉiuj aktivaj esperantistoj kaj la respondeculoj de kluboj legu, aŭ relegu tiujn valorajn konsilojn.

INFORM-CENTRO EN USONO

Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko (E.L.N.A.) akiris novan informcentron je la jena poŝta adreso : P.O. BOx 508, Burlingame C.A. 94010.

Tiu centro, kies direktoro estas S-ro Charles Power, estas nova pruvo de la atentinda progreso de la esperanto-movado en Usono, depost kelkaj jaroj, ĉefe inter dinamismoplenaj universitatanoj.

EN ZAIRO

Kelkaj aktivuloj refondis lastjare Esperanto-Instituton en Zairo. Ĝi alvokas subtenon, interalie sub formo de donacoj de lernolibroj kaj vortaroj prefere franclingvaj. Adreso : S-ro K. Braet, B.P. 5155, Kinshasa 10, Zaïre.

EN SUDA KOREUJO

Sekve de sukcesa monkolekta kampanjo, la esperanto-movado en suda Koreujo disponas nun pri propra oficejo en la centro de Seoul. Pluraj centoj da libroj estis ankaŭ jam kolektitaj. Adreso : I.P.O. 1232, Seoul 10 Koreujo. — Antaŭ kelka tempo aperis preskaŭ 200-paĝa « Perfektiga Kurso de Esperanto » ĉe konata eldonejo.

KURSO EN UNIVERSITATO

La universitato de Turku (Finnlando) pozitive reagis al petskribo de Esperantistoj kaj decidis inkluzivi la internacian lingvon en la programo de la fakultato de humanismaj studoj.

NOVA RADIO-ELSENDO EN VARSOVIO

Depost la 6a de Majo, al la du ĉiutagaj elsendoj en Esperanto, en Radio-Varsovio, aldoniĝis tria, je la 22 h. 30 (M.E.T.), sur la mallonga ondo 49 m kaj sur la meza 200 m.

La ora epoko de Hamburgo

HAMBURGO, loko de la 59a U.K. de U.E.A., BREME, LUBECK, urboj de la Germana hanso — pli simple : « HANSO » —, la plej grava el la hansoj, radiis de la 12a ĝis la 18a jarcentoj ne nur ekonomie sed ankaŭ kulture. Precipe la muziko atingis tie altan nivelon de perfekteco.

Hamburgo rajtas fieri pri multaj komponistoj.

Dum la 16a kaj 17a jarcentoj pluraj membroj de la fama familio Preatorius iĝis « kantoroj » kaj komponis religian muzikon. Konataj estas Jakobo la avo, Hieronimus la filo, Jakobo kaj Johano la nepoj. Hieronimus (1560-1629) estas konsiderita kiel la unua grava komponisto de Norda Germanio. Li estas la « patro » de la moteto.

(Alia Preatorius, Mikaelo, samepoka estas nun pli konata. Li ne vivis en Hamburgo, sed en Turingio. Oni ofte aŭdas per disko lian verkon « La Dancoj de Terpsikore »).

Dum la 17a kaj la 18a jarcentoj sinsekvis en Hamburgo komponistoj kaj orgenistoj :

REINKEN (1623-1722) orgenisto en preĝejo Sankta Katerina kreis la operejon de Hamburgo. Post la morto de Buxehulde en Lübeck (1707) Reinken iĝis la plej fama orgenisto de Germanio. J.S. Bach plurfoje (1700, 1703, 1720) vojaĝis al Hamburgo por aŭskulti lin kaj ricevi konsilojn. Pri la 3a vojaĝo ni havas ateston de la dua edzino de J.S. Bach. Bele, naive kaj emocie ŝi rakontas pri tiu evento en la unua ĉapitro de sia verko : « Malgranda Kroniko de Ana Magdalena Bach ». Tie ŝi ankaŭ diras, ke li kandidatis por posteno de orgenisto en Hamburgo, sed sen sukceso.

KUSSER hungara komponisto, kiu multe vojaĝis tra Eŭropo, restadis en Hamburgo de 1693 ĝis 1697, kie li komponis operojn. Li estis orkestr- kaj kapelestro antaŭ Keiser.

KEISER (1674-1739) restadis en Parizo kaj lernis de Lulli. Li venis al Hamburgo, kie estas ludita kun sukceso lia opero « Basilius » en 1694. En 1728 li ricevis la postenon de Kantoro de la Katedralo. Lin oni konsideras kiel « patron » de la germana opero, la « Singspiele ». Pli ol cent operojn li verkis.

MATTHESON (1681-1764) la plej Hamburga, ĉar li naskiĝis kaj mortis en la hans-ĉefurbo. Frumatura knabo li unue ludis orgenon kaj kantis en la operejo. Plenaĝulo li iĝis muzika direktoro de la katedralo. Amiko de Haëndel kaj Telemann, li havis grandan influon al la komponistoj de tiu epoko. Malfeliĉe li devis rezigni la muzikarton pro pli kaj pli grava surdeco. Multo el lia granda verkaro detruita dum la lasta milito estas verkoj, kiuj bedaŭrinde malaperis.

GEORG — FRIEDRICH HAENDEL naskiĝis en Halle (1685). Tie li studis kaj renkontis Telemann. En jaro 1703 li alvenis en Hamburgo, kiel violonisto kaj poste klavinecisto en la orkestro de la operejo, kiun estris majstro Keiser. En 1705 oni ludis du operojn de Haendel : Almiro, kaj Nero, kiuj ricevis sukceson. Li amikiĝis kun Mattheson, kaj post la morto de Buxehulde ambaŭ klopodis por iĝi orgenisto, sed ili rezignis pro la postulo : edziĝi kun la filino de Buxehulde (du jaroj poste ankaŭ J.S. Bach rezignis pri la posteno pro la sama kaŭzo). J.S. Bach esprimis grandan admiron al Haendel, kiun li tre deziris renkonti, sed tiu renkonto neniam ebliĝis. Haendel vojaĝis al Italujo. Kiam li revenis, lin dungis Princo-Elektisto de Hanovre. De la Hamburga restado de Haendel post-restis lia verko : Pasio laŭ St-Johano (1704). Poste Haendel vivis en Anglujo.

GEORG-PHILPP TELEMANN (1681-1767). naskiĝis en Magdeburg, studis en Leipzig, vojaĝis al Berlino, Parizo, kie li lernis de Lulli, alvenis Hamburgon dum somero 1721, ricevinte postenon kiel direktoro kaj kantoro de « Johanneum » kaj de la kvin plej gravaj preĝejoj de la urbo. Tial li devis komponi okaze de ĉiuj dimanĉoj kaj festaj diservoj, kaj ankaŭ okaze de tradiciaj kaj politikaj eventoj. Plie, de 1722 ĝis 1735, li fariĝis estro de la operejo. Li komponis pli ol 25 operojn. Je fino de sia vivo li verkis multajn gravajn oratoriojn. Lia vastega verkaro entenas ankoraŭ muzikon por diversaj instrumentoj, la « tablo-muziko ». Li diris, ke li praktikas ĉiujn instrumentojn. Fakte li verkis por ĉiuj genie kaj pionire, kunigante la germanan baz-firmecon kaj la italan influon. Krom sia muzika aktiveco li zorgis, havis multajn okupojn. Junulo li lernis la latinan, grekan, francan lingvojn, kaj filozofion. Plenkreskulo li ne nur komponis, sed li instruis pri muzik-arto, kaj historio. Li gravuris sur kupro multajn el liaj verkoj kaj de aliaj komponistoj. Plurfoje li vojaĝis al Berlino, al Parizo por kolekti mendojn. Daŭre li pritraktis kun multaj korespondantoj muzikajn kaj aliajn temojn, (ekz : pri floroj, kiujn li pasie amis). Li verkis tekstojn, kelkfoje tre gajajn eĉ malprudajn, de siaj cirkonstancaj komponaĵoj, por edziĝ-festoj kaj aliaj. Li tute ne sentis orgojlon pri sia verkaro. Li mem konfesis, ke li sin kopiis multfoje tra sia abunda produktaro. Tamen li estis jam fame konata, kaj iĝis modelo por aliaj komponistoj : J.S. Bach, Haendel, Mozart. Ĝis 1850 lia gloro estis granda, sed tiam li subite falis en tutan forgeson. Nia jarcento revivigis liajn komponaĵojn kaj disvastigas lian verkaron (ne ankoraŭ tute esploritan) per diversaj diskoj.

Kaj nun, kio pri muzikarto en Hamburgo ? Respondo estas en la turismaj prospektoj. Dum la pasinta jaro, 140a datreveno de la naskiĝo de J. Brahms en Hamburgo, tuta programo pruvis, ke Hamburgo restas ĉefurbo de muziko. La opero estas el la plej famaj de la mondo, same la Muzik-halo. La orkestroj kaj la ĥorusoj estas monde konataj. Certe muzik-amantoj ĝuos la restadon en Hamburgo !

Marcelle TURIN.

Sekretoj de la enderma arto

Antaŭ ne tiel longe Tatuo ne kuraĝis laŭte prononci sian nomon. Sed la nuntempa scienca progreso kutimigis nin al nova terminologio. Sinjoro Bruno estas hodiaŭ enskribita en la Meti-Registro sub la nomo de « Enderma Desegnisto ».

La fotoj, kiuj ornamas la murojn de lia laborejo estas plej diversaj. Honora loko por Frederiko de Danlando, kiu, dum sia tuta vivo, konsideris sin mar-oficiro ; tamen post lia edziĝo, li forlasis tiun preferatan okupadon. De tiu marista tempo li konservis sur sia brusto belegan drakon.

La najbaroj estas multe malpli moŝtaj. Jen « dikbrakuloj » tatuitaj de kapo ĝis la piedoj. Unu el ili portas sur la dorso scenon de Pasiono ; ĝi ŝajnas naiva desegno laŭ doganisto Rousseau.

Mi admiras damojn, tre malmulte vestitajn, kies ĉarmoj estas fidele dediĉitaj al iaj Alfonsoj, Ernestoj aŭ Juloj. Grandaj plurkoloraj desegnoj reprezentas la diversajn motivojn elfaritajn ĉi-hejme. Bruno ilin apartigas laŭ 5 kategorioj : sentimentala, socio-liberiganta, politiko-militista kaj imitantaj.

— « Dank'al la ekspoziciitaj tatuaĵoj, diras Bruno, mi povas helpi la hezitemajn klientojn ; ĉar, certe, tatuigi sin ne estas nura kaprico ; ĝi havas grandan valoron psiko-intelektan. La Tatuoto deziras fiksi en si mem, ekzemple, entuziasman momenton de sia juneco. Kiam kliento petas de mi, ke mi inkrustu sur lia brusto ruĝan rozon kronitan je « Al Berta, por la Vivo » li nepre deziras ĉiamigi tiun feliĉegan senton. Li fiksas sian libidon.

— Sed, se post kelkaj monatoj, la amatino ne plu nomiĝas Berta ?

— Kompreneble, la fideleco-koncepto pli kaj pli senvaloriĝas ; sed la talento de la artisto kaj la scienca progreso permesas sekvi la evoluadon de la sentimentoj. Facile mi povos anstataŭigi Berta per ia ajn antaŭnomo.

Kredu min, unu monato ĉe mia profesio egalvaloras longan praktikadon de psikanalizo. Mi estas samtempe aŭtodidakto kaj empiristo ».

STATIKISTOJ : « En 1964, diras Bruno, unu el miaj klientoj subtenis en Liono, Doktoreco-Tezon pri Juro. Li certigis, ke 17 % de la franca loĝantaro estas tatuita (tatuado estis distraĵo por la soldatoj de la Unua Mondmilito).

Laŭ la sociologoj Tatuo estas konsiderata kiel senhonoriga nur en la kalotikaj landoj. Fakte, en 781, la Koncilio de Niceo ĝin dekretis puninda je ekskomuniko.

Kontraŭe en Skandinavio, Anglujo, Usono, ĝi plej floras. En Ameriko 34 milionoj da viroj kaj 12 milionoj da virinoj fieras pri siaj endermaj bildoj ».

Pri realeco de tiuj statistikoj, mi dube paŭtas... Bruno rapide mangestas, momenteton silentas kaj iom akre daŭrigas : « Bone aŭdu, en Francio nur 1 % de la virinoj estas tatuitaj... ili estas malfruiĝemaj ! »

« Nuntempe tatuado ne plu varbas siajn adeptojn en la friponaro ; en tiu medio, oni tute ne deziras rimarkigi sin per tiaj propraj signoj ! Kontraŭe, estas la « aristokracio », kiu bezonas liberigan sorĉesprimon ; inter miaj klientoj, mi havas prokuroron, advokatojn, kuracistojn. Pro sia metio, ili estas devigataj ĉiutage superregi la novojn de sia animo.

Ja, liberigo estas nepre necesa. Desegnoj, sloganoj (ekz. : Morto al bov...oj) inkrustitaj en ilia haŭto alportas al ili konstantan, diskretan kompenson.

Jen ekzemplo : mi havas du klientojn ; unu estas uzino-laboristo, la alia estas lia direktoro ; ambaŭ estas fervoraj adeptoj de l'tatuo ; ĉizigi sur sia haŭto malrespektajn formulojn aŭ bildojn ilin psike liberigas. La unua ribeliĝas kaj diras « M... » al sia estro ; la alia ĵetas defion al la Socio kaj sentas sin superanta ĉiajn antaŭjuĝojn.

Jen alia pruvo :

Multaj klientoj petas, ke mi gravu sur ilia brusto krucon de Honora Legio ; por la ne-dekoraciitoj, tio egalvaloras sorĉkanton ; al la Komandoro, al la Kavaliro, tiu enmema desegno permesas ĝui sian indecon 24 horojn ĉiutage !

Sur la muroj paneloj montras falĉileto-kunmartelo, hokokrucon, lilio-floron ; ĉiu insigno estas gravurita je preciza loko : svastiko sur la maldekstra ingveno ; la lorena kruco preferas la antaŭbrakon kaj la lilio-floro sin kaŝas ĉe manartiko sub la brakhorloĝo. La plej multaj « politikaj » klientoj estas la Negroj ; ili deziras sur la dekstra vango la stelon de la Negra muzulmana sekto.

Antaŭ ol esti Tatuisto, Bruno vendis fruaĵojn ; pro la nesufiĉaj gajnoj, li decidis serĉi alian metion. Li turnis sin al telefono-desinfektado, sed jam tro multaj estis la dungitoj. Hazarde

li trovis libron pri Tatuo-arto. Dum longaj monatoj li lernis en la urboj ĉefaj pri tiu arto : Kopenhago, Hamburgo, Amsterdamo.

Li instaliĝis en Parizo. Li klarigas :

« La prezoj varias laŭ la klientoj kaj laŭ iliaj deziroj ».

Kelkaj timas kaj unue oni bezonas tempon por ilin trankviligi. Pli longa tempo estas necesa por fortatuado ; ĝi pli kostas. Cetere, leĝo de 30-11-1892 limigas ĝian praktikadon. Tial mi petas kunlaboradon de kelkaj medicinistoj de mia kvartalo.

Sed utila al ĉiuj estus t a t u a d o de ilia sanga grupo ; dum la lasta mondmilito la S.S. estis devigataj ĝin havi sub sia maldekstra akselo. Dank'al ĝi pli rapida estus la transfuzo por akcidentitaj personoj.

Jef eniras kun kamarado. Li estas kliento... nekontenta.

« Bruno, li diras, la ruĝo de mia serpento estas tro pala, ŝajnas, ke mi portas angvison !

— He ! ci estas pli malpacienca ol etvirino ; mi cin avertis : atendu kelkajn tagojn !

— Nu, nu, oni atendos !... Sed mi deziras konsilon : (li malbutonumas sian ĉemizon kaj montras sian bruston). Vidu tio estas la portreto de mia patrino (juna virino simila je bela Otero) mi dezirus, ke vi faru al ŝi rozkronon ; kion vi pensas pri tio ?

— Bruno paŭtas kaj delikate klarigas :

— Mi ne konsentas kun ci ; tiu rozkrono tute fuŝus la portreton. Jef estas iom ĉagrenita...

Ha, bone ! Do, rigardu mian dorson (kraĉanta flamojn, drako ornamas lian dekstran skapolon). Ĉu vi ne povus desegni ion ĉinan sur la alia flanko ?

— Eble ĵinrikŝo — diras la kamarado.

— Konsentite, diras nia Tatuo-Majstro, sed diru al mi : kiu faris tiun bildaĉon ?

— Ho ! estas kolego, en malliberejo.

— Jes, tion mi pensis, estas unukolora, amatora laboro, mane farita. Hodiaŭ la progreso donis al ni elektran aparaton. Se ci volas, mi aranĝos tiun drakon kaj ĝin ruĝe kaj verde kolorigos ; kaj mi preparos desegnon kaj prezoprojekton por la alia skapolo. Hodiaŭ mi tuj kolorigos la langon de cia drako.

— Ĉu ne estas doloriga ? diras la kamarado, kaj pri ebla infektado, kion vi faras ?

— Vidu, respondas Bruno, mia aparato funkcias je 5 000 pulsadoj pominute ; por asepsigi mi kovras la tatuaĵon per antibiotika vazelino.

Nova kliento alvenas ; blonda, maldika. Li tuj demandas :

— Kiom kostas ankron kaj kiom da tempo estas necesa ?

— Apenaŭ dek minutojn por 20 frankoj.

— Sed mi estas militisto ; ĉu mi ne riskas punon ?

— Tute ne ; tatuo ne estas malpermesita en armeo, kondiĉe ke ĝi ne estu pornografia.

— Bone, diras la legiano ; mi dezirus tatuigi min de kapo ĝis piedoj ; oni diris al mi, ke, poste, oni povas hipoteki tre koste sian haŭton ; ĝi iĝis kurioza ĵ o !

Bruno ne povas precizigi la klaŭzojn de tia kontrakto. Sed, ŝajne, oni vendis, en la ĉina kvartalo de Amsterdamo, malgrandajn kvadratojn de homa haŭto, pergamenita kaj kovrita je tatuaĵoj.

MONO - ĜIA NASKIĜO

Ĉe ŝtona tempaĝo la bezonoj de la homoj estis modestaj : manĝi, trinki, sin varmigi. Ili devis fronti la Fortojn de la Naturo, kiun ili konsideris loĝata de demonoj kaj dioj. La dioj estris pluvon, sekecon, ŝtormojn, fulmon, tondron, malsaton, ĉasaĵon, vivon kaj morton. Fronte al tiuj fortoj la homo sentis la bezonon igi la diojn favoraj al li ; tial li alportis sur iliajn altarojn oferaĵojn kaj buĉoferojn. La plej ofta oferado estis brutaro. (Kapitalo estas vorto de latina deveno, « kaput », kiu signifas « besto-kapo »), (rupio, hinda monero devenas de « rupa », kiu signifas « bovo »). La herooj de Homero estimis per bovoj la valoron de siaj armiloj. Egiptoj, arkaikaj Germanoj kaj Romianoj ankaŭ kalkulis per bovoj. En Biblio, la danco ĉirkaŭ la



Or-Bovido elvokas la kulton, kiun oni portis al ĝi ; la taŭro-mortigado, la floroj, kiuj ornamas la kornojn de la bovoj, okaze de Pentekosto, en kelkaj regionoj, memorigas pri tiu praa kutimo.

Pli poste, oni alportis en la templojn, ŝtonajn objektojn : lancojn, hakilojn, grandajn ŝtonajn diskojn ; ili estis pli facile manipuleblaj kaj pli facile konserveblaj. Ili konstituis la unuan « trezoron » de la dioj. Tiu, kiu alportis multajn oferaĵojn estis bone konsiderata de la dioj kaj sekve multe respektata en sia tribo. Tial, apud sia religia valoro, la « trezoro » prenis socialan valoron.

En metala tempaĝo aperas aliaj objektoj. En Grekujo estas tripiedoj kaj bronzaj vazoj ; en Italujo bronzaj basenoj kaj tranĉiloj ; en Ĉinio metalaj ringoj. Kaj aperas la juveloj ; kolieroj el perloj, el konkoj, bronkaj fingro-ringoj kaj oraj juveloj ; ili estas oferitaj al la supernaturaj potencoj kaj investas potencon al la oferanto. La Mikeno-Princoj havis luksegajn armilojn.

En Ĉinio estis sorĉaj sonoriletoj. La militestroj donacis tiujn juvelojn kaj armilojn ne nur al dioj, sed ankaŭ al siaj amikoj kaj militkunuloj. Tiuj riĉaĵoj fariĝis interŝanĝaj donacoj inter tribestroj kaj ankaŭ « elaĉetmono » por liberigi kaptitajn reĝojn kaj princojn.

Tiuj interŝanĝoj estis la unuaj paŝoj al Mono.

Varinterŝanĝo :

Jam de la ŝtona tempaĝo la homoj sentis la bezonon superpaŝi la vivnecesan minimumon. Plie, pro propraj naturaj talentoj, la homoj fariĝis ĉasistoj, bredistoj, potistoj, il-fabrikantoj. En kelkaj regionoj troviĝis bonkvalita siliko por fari armilojn kaj laborilojn, sed estis nek salo, nek argilo ; kontraŭe alie troviĝis argilo, salo, sukceno sed ne siliko. Tial naskiĝis la bezono interŝanĝi, inter najbaroj, la troaĵon de ĉiu. Estis la komenco de varinterŝanĝo.

La interŝanĝoj estis, unue, reciprokaj donacoj. Jen kiamaniere Homero (490-425 ant. K) ĝin priskribas : « Komerca ŝipo albordiĝas ĉe fremda marbordo. La negocistoj iras sur la plaĝon, eksponas siajn varojn kaj tuj reiras al sia ŝipo por montri siajn pacajn intencojn. La tieaj loĝantoj aperas, rigardas la objektojn, estimas ilian valoron, kaj siaflanke, nenion prenante, elmetas siajn proprajn varojn... kaj retiriĝas por ne ĝeni la negocistojn. Tiuj ĉi revenas kaj ekzamenas la kontraŭparton. Se ili estas kontentaj ili ĝin prenas kaj lasas siajn varojn. Se ili estas nekontentaj ili malpliigas sian proponitaĵon kaj reiras al ŝipo, farante tiamaniere novan proponon, K.T.P.... Tiu marĉandado daŭras ĝis ambaŭ partoj estas tute kontentaj ».

Malfacilaĵoj de la varinterŝanĝo : Se viro volis interŝanĝi sian bovinon kontraŭ 4 kaprinoj, li devis fari, piede kompreneble, longan vojaĝon, ĝis li finfine renkontas tiun, kiu akceptas bovinon kontraŭ 4 kaprinoj. Sed, fine de la vojaĝo viro kaj bovino estas tute elĉerpitaj kaj la valoro de ambaŭ estas multe malpliiĝinta ! Facile li estus povinta ricevi, kontraŭ sia bovino, hakilojn, porkojn, armilojn aŭ potojn Povas troviĝi, ke la kaprinoj-posedanto bezonas ŝaffelojn aŭ argilajn potojn, sed tute ne bovinon. Pera rimedo montriĝis nepre necesa ! La bovino-posedanto ŝanĝis la beston kontraŭ armiloj aŭ hakiloj. Poste, pere de ili, li facile havigos al si 4 kaprinojn.

La fera tempaĝo alportis veran « interŝanĝan monon » :

Baldaŭ ekzistis pag-rimedoj : ŝtonaj diskoj en la Karolin-Insuloj, fiŝoj en Alaska, kakao-faboj en Meksikio, rizo en Hindujo, tegoloj en Egiptujo, te-brikoj en Mongolio, Tibeto, Manĉurio (hodiaŭ oni ankoraŭ uzas tebrikojn en kelkaj regionoj : 80 te-brikoj egalvaloras unu ĉevalon. — En Afriko valoras ankaŭ la katangaj). Oni uzis ankaŭ la mon-konkojn (cauris). Per tiuj konkoj oni povis fari fiŝhokoj, tranĉilojn, pinglojn kaj kolierojn. Estis la tiama dolaro « forta devizo », ĉie interŝanĝebla kaj eksterordinare stabila. Hodiaŭ ili ankoraŭ servas en Afrikaj vilaĝoj (en Alta Volta, antaŭ nelonge 5 mon-konkoj valoris unu frankon C.F.A.).

La malkovro de bronzo okazigis renverson de la valoroj kaj donis riĉecon al la landoj kaj al la estroj, kiuj ĝin posedis. El ĝi oni faris stangojn, laborilojn, armilojn, uzilojn, vazojn, juvelojn, ringojn kaj finfine monerojn, kiuj, pli kaj pli, iĝis universalaj.

Apero de Oro kaj Arĝento, la magiaj metaloj :

Kvankam oro kaj arĝento estas malpli rezistemaj ol bronzo, egale raraj kiel sukceno kaj eburo,

egale neŝanĝeblaj kiel mon-konkoj, Oro kaj Arĝento prenis la unuan lokon.

Estis Suno kaj Luno, kiuj donis al oro kaj arĝento ilian magian valoron. En Mezopotamio, 4.000 jarojn antaŭ Kristo, oni praktikis la kulton de la Astroj. Por ilin observi tiu civilizacio konstruis altegajn turojn, inter kiuj la Babel-turo. Suno kaj Luno estis konsideritaj kiel di-astroj. En Babilono la pastroj klarigis, ke estas strikta rilato inter Oro kaj Suno kaj inter Arĝento kaj Luno. Tiuj pastroj, kiuj estis eminentaj matematikistoj, fiksis la rilatumon inter oro kaj arĝento je 1/13,4, bazante sin sur la ratio inter la suna jaro kaj la luna monato.

De tiam la fragmentita arĝento fariĝis pagorimedo. Ankoraŭ ne estis moneroj ; oni pezis la arĝento-pecojn ; la bazo estis tritikero, kiu pezas 0,065 gr. (hodiaŭ ankoraŭ uzata en juvelarto). Oni kreis zekinon, kiu pezis 180 gr. ; 60 zekinoj valoris unu talanton ; tiu ĉi monero estis tiel peza, ke oni estis devigata ĝin konverti en or-moneron. Oro cirkulis ne pli ofte ol hodiaŭ. Oni ĝin gardis en la kriptoj de la temploj ; ĝi servis nur por la interŝanĝoj kun la aliaj landoj. Egiptaj bareliefoj reprezentas Azianojn donantajn or-brikojn al Faraono.

Tiu oro estis gardita en la temploj kun ŝtonblokoj, kiuj konstituis la pez-normojn, kies formoj estis plej diversaj : anasoj en Babilono, bov-kapoj en Egiptujo.

La temploj estis iĝintaj « depono-bankoj » sub la protektado de la dioj ; sankta karaktero montriĝis en Babilono per uzo de la dekdu-uma sistemo, elektita por ĝin rilatigi kun zodiako, kiu entenas la 12 signojn, kiuj determinas la iradon de la astroj dum la jaro. Tiu dekdu-uma sistemo estis enkondukita en Eŭropon de Charlemagne (Karlo la Granda), kiu decidis, ke 12 arĝentaj denaroj valoros unu soldon. Tiu sistemo donis en Anglujo 12 pencojn por unu pundo.

Bankaj temploj — ĝiro-pagoj. Antaŭ 2.000 jaroj ekzistis en Babilono interna kaj ekstera komerco, tre aktiva. Merkatoj kaj foirejoj staris ĉe ombro de la temploj. Estis la pastroj, kiuj redaktis la kontraktojn, kiujn atestantoj markis per sia sigelo, kaj kiuj estis klasigitaj en la temploj. Ilin oni retrovis po miloj. La temploj fariĝis mon-deponejo kaj arkiv-oficejoj. Baldaŭ montriĝis neeble transporti pezajn sakojn da mono por efektivigi pagojn (por aĉeto de sklavoj, por luprezo de irigacia akvo, por aĉeto de varoj). En la fino de la 2.000-a jaro ant. K., la Mikena talanto havis formon de bovo kaj pezis 25 kg. 500 !

La Babilonaj pastroj, kreis akreditaĵojn, kiuj samvaloris en similaj temploj. Estas nur en Mezepoko, ke tiu sistemo atingis Eŭropon kaj ke instaliĝis la ĝirpago sen kontanta mono. Apud la bankoj de la temploj, naskiĝis la privataj bankoj, kiuj ankaŭ havis siajn argilajn tabuletojn, kiujn oni retrovis grandnombre.

Evaluado de la mono

Jam de la 7-a jarcento ant. K. oni renkontis en Lidio la nunajn monerojn el elektrumo, alojo de oro kaj arĝento, kiun oni trovis naturstate en la landaj riveroj. La reĝo de Lidio, Krezo (Cresus) fama pro sia riĉabundo, emisiis la unuajn or-kaj-arĝentajn monerojn. En Persujo Dario (Darius) stampigis la darkemonojn el oro, sur kiuj li montriĝis ne kiel reĝo, sed kiel genuinta arkisto, dia enkorpiĝo. En la Grekaj urboj kaj « kolonioj » ĉiu reganto rajtis monon stampi. La sankta origino de mono, protekto de la dioj inspiris la stampojn de la moneroj. En Cnide estas la kajo de Afrodita, en Sirakuzo estas Nike, la diino de la Venko, en Argos la testudo de Pozidono, en Efezo la abeloj de Artemisa, en Metaponte la spikoj de Demetera. En Elis la fulmo de Zeŭso ; en Delos la liro de Apolono. En Ateno, la drakmo, kiu montris la noktuon de Palasa-Atena egalvaloris 6 obolojn. Origine obolo devenis el « obolos », kiu estis bronzo-broĉo, per kiu oni rekompensis la bonajn ŝtat-servantojn. 100 drakmoj formis unu minon ; 60 minoj egalis unu talanton. Grekujo turniĝis al dekuma sistemo.

Ateno fariĝis la mona centro de Grekujo ; ĝiaj minejoj de Laurion abunde liveris arĝenton kaj sur la kajoj de Pireo-haveno oni vidis la tablojn de la mon-ŝanĝistoj. Estas Solon, fama greka leĝo-faran-



to, kiu, en 600 ant. K., procedis al mona operacio, kiu devis fariĝi klasika : unu devaluto ; sufiĉas malpliigi la entenon de la valora metalo en la moneroj. Solon alliniigis la Atenan monon laŭ tiu de Persujo ; tio faciligis la komercon. Monoj el ĉiuj partoj de la konata tiama mondo alfluis en Atenon. Estis en Partenono, sur la Akropolo, la citadelo de Ateno, ke oni gardis la milit-trezoron de la aliancitaj urboj de Atiko. La noktuo de Atena longtempe restis la plej stabila devizo.

Granda renverso

Apero de mono en Grekujo havis gravajn konsekvencojn. En la komenco la moneroj estis raraj kaj grandvaloraj. Oni ilin interŝanĝis kontraŭ grandaj kvantoj da varoj. La kamparanoj estis ruinigitaj de la komercistoj. La kampulo, kiu antaŭe, donis tritiko-sakon por ricevi kruĉon, devis nun doni 5 sakojn por la monero necesa por pagi la kruĉon. La kampuloj falis en la manojn de la uzuristoj, perdis siajn bienojn kaj kelkfoje fariĝis sklavoj. Kampoj, brutoj, vitoj perdis sian valoron. La nobeloj, forlasante siajn bienojn por manpleno da moneroj, perdis sian potencon. Kelkaj, jam, konsentis edziĝi al filino de riĉa nenobelo por « reori sian blazonon ».

Ĉie en Grekujo, naskiĝis malordoj, masakroj, ribeloj kaj ŝtat-renversoj, kiuj longe rezistis al la ŝtata potenco.

El la libro de Roland NITSCHE (daŭrigota)
« La Mono ».

Mistera ekskurso

Mi estis taksiistino en Parizo. Mi atendis proksime de hotelo, kiam viro kun valizo ĉemane eliris el ĝi kaj petis, ke mi konduku lin al Austerlitz-stacio ; ĉi tie li pagis min kaj aldiris : « ĉu vi povas atendi momenton ? mi ne scias ĉu mi trafos mian trajnon por Bayonne. Jen plia mono ; se mi ne estas ĉi tie post 20 minutoj, vi povos foriri. Post momento li revenis dirante « Jen tio, kion mi timis ; mi maltrafis mian trajnon ; estas tre malagrable por mi ; ĉu vi povas konduki min al Sauveterre-de-Barn ?

« — Kiom da kilometroj por tiu kurso ?

— Proksimume 1 000 km.

Mi malfermis larĝajn okulojn : « Vi petas de mi kurson 1 000 - kilometran ?

— Kompreneble, via reveno estos pagita. Mi vivtenos vin dum la vojaĝo kaj plie vi ricevos bonan personan monkompenson. Mia nomo estas Bernard Sala kaj mi vojaĝas por miaj aferoj.

— Sed, mi neniam vojaĝis tiel malproksimen !

— Nu, unue ni iru por vespermanĝi ; ni parolos pri ĉio tio dum la manĝo ». Ni bone vespermanĝis en restoracio specialigita en bearnaj manĝaĵoj. Li estis 50-jara viro, simpatia, solida kun decidema aspekto. Li inspiris al mi fidon.

« — Nu, ĉu vi decidiĝis ? Vi faros belan vojaĝon. Pireneoj estas certe tre belaj kaj vizitindaj.

— Konsentite, sed mi devas averti mian dunganton ; mi devas telefoni ».

Pleniginte la rezervujon, ni forlasis Parizon direkte al Orleans, Chateauroux, Limoges K.T.P. Baldaŭ noktiĝis ; estis malmulte da veturiloj ; mi regule veturis je 100-120 km-hore ; estis vera plaĉo por mi, kiu ĉiam devis veturi malrapide sur la stratoj de Parizo. Mia kunulo estis brila kaj amuza parolanto, kiu igis la vojaĝon tre agrabla. Ĉirkaŭ la unua matene, li anstataŭis min ĉe la stirrado kaj mi dormetis dum kelka tempo.

Estis plentage, kiam mi vekiĝis. Mi malkovris regionon kiun mi tute ne konis.

« — Ĉu ni baldaŭ estos en Sauveterre-de-Bearn ?

— Ni ĵus ĝin preterpasis. Dum vi dormis, mi pensis, ke estos al mi pli bone iri pli malproksimen ; miaj aferoj okazas en la tuta regiono. Sed ne turmentiĝu, la taksiometro registras la kilometrojn ! »

Estis nenio kontraŭdirota.

Ni haltis en granda albergo, rande de la strato kaj malproksime de la urbo. Post abunda tagmanĝo oni kondukis min en ĉambron por momenta ripozo. Mi endormiĝis ; kiam mi vekiĝis estis la 19-a. Mia kunulo atendis min en la salono.

« — Ĉu vi bone ripozis ? Perkekte, ĉar mi ankoraŭ bezonas vin ; mi ĵus sciis, ke mia propra veturilo ankoraŭ paneas.

— Verdire, mi devas telefoni al mia dunganto ; dum kiom da tagoj vi ankoraŭ bezonos min ?

— Du aŭ tri. Rapidu por telefoni ; ni vespermanĝos kaj foriros.


— Ankoraŭ dum la nokto ?

— Jes, tio permesos al mi ŝpari tempon kaj mi devas esti la plej frue kiel eble en Hispanujo.

— Sed, mi ne havas pasporton !

— Trankviliĝu, kun mi, pasportoj ne estas bezonaj. Via veturilo estas preta. Mi petis de la garaĝisto, ke li kontrolu benzinon, oleon kaj bremsojn. La montaj vojoj postulas bonstatajn bremsojn. Mi gvidos vin. »

Longtempe ni laŭsekvis sinuajn vojojn. Poste ni trovis nur padojn por muloj, kiuj randiris abismojn. Ni estis ĉirkaŭitaj per montoj ; ĉio estis nigra, silenta kaj dezerta. Mia ekskurso montriĝis pli kaj pli eksterordinara aventuro ;



ĉar mi estis scivolema, tio ne malplaĉis al mi.

Ni finfine atingis sovaĝan plataĵon, kie staris kabano. Du viroj, botitaj kaj vestitaj je kruda veluro alsignis al ni, kiam ili vidis la veturilon. Mia ĉeesto, videble, malplaĉis al ili ; sed, sendube, Bernard Sala ilin trankviligis, ĉar ili ne plu atentis min. Interne de la rifuĝejo, ŝtipoj brulis sur kiuj varmiĝis kafo, kiun ni trinkis en malnovaj metalaj tasoj. La tri viroj longe interparolis en dialekto, kiun mi ne komprenis. Ni foriris. Sed jam tagiĝis, kaj ni estis ankoraŭ sur la monta vojo, kiun obstrukcis multaj ŝafaroj : almenaŭ mil bestoj.

Ĉe akra vojturno Bernard Sala haltigis min ; ni elveturiĝis kaj li montris al mi, malsupre, dikan amerikan aŭtomobilon, kiu estis frakasiĝinta en la fundo de la abismo.

« — Kio okazis al la ŝoforo ?

— Li saltis ĝustatempe, preferante forlasi sian veturilon prefere ol sia vivo. La ŝoforo estis mi ; sed, saltante, mi vundis mian brakon ; tial mi povas konduki sur rektaj stratoj sed ne sur tiuj sinuaj montaj vojoj. Jen kial mi bezonis vian helpon. Plie mia nova veturilo alvenos nur post 3 semajnoj.

Mi komencis kompreni, ke liaj « aferoj » estis strangaj, misteraj. Por gardi ilin sekretaj, li preferis ne dungi la ĉi tieajn loĝantojn.

La morgaŭo estis ripoz-tago. Ĉasistoj estis rendevuintaj por batuo de skolopoj. Oni pruntedonis al mi botojn kaj ledan jakon. Tio okazis piede de Pireneoj ; oni montris al mi, antaŭ ni, la glaciejojn de Monto « Perdu » kaj de « Maladetta » kiujn superstaris Nethou kaj Pic du Midi. Post la batuo, kiu estis fruktodona, ni retroviĝis en vilaĝeto, la lasta domaro piede de la franca deklivo. Tie ĉi oni manĝis kun la doganistoj, al kiuj Bernard Sala certigis, ke ili igis la landlimon tute ne transirebla. Amuza renkonto, kiam oni pensas, ke ni estis ĵus revenintaj, diskrete, el Hispanujo.

La dua ekspedicio okazis la morgaŭon vespere. Bernard Sala gvidis min laŭ malfacilaj vojoj. Jam noktiĝis ; ĉi-foje la veturilo ne kondukis nin ĝis la celo. Super ni domo brilis sub la luno.

« — Mi iras al tiu farmo ; oni devas marŝi unu horon laŭ abruptaj padoj por ĝin atingi ; ĉu vi atendas min ĉi tie aŭ ĉu vi akompanas min » ? Mi preferis lin sekvi.

La farmo estis malgranda kaj ruiniĝanta. Li ekfrapis laŭ aparta maniero. Virino malfermis la pordon.

— Kie ili estas ?

— En la rifuĝejo.

— Mi iras tien ; bone zorgu la sinjorinon.

La interno estis mizera ; mi eksidis sur unu el la benkoj, kiuj ambaŭflankis longan tablon. Mi turniĝis al la fajro dum la virino, sidanta en angulo de la ĉambro, silente rigardis min kun timigita mieno.

« — Ĉu vi enuas ĉi tie ?

— Mi estas alkutimiĝinta kaj mi havas miajn infanojn, kiuj dormas supre ; 14 infanoj : 5 filoj kaj 9 filinoj » ; ŝi estis edziĝinta, kiam ŝi estis 16-jara kaj de multaj jaroj ŝi neniam reiris al la vilaĝo ; estis ŝia edzo, kiu faris la aĉetaĵojn ; ŝia unuenaskito ĵus formigris al Sud-Ameriko ; li instaliĝis tie kaj sendis monon al siaj gepatroj.

La rezignacio de tiu virino mirkonsternis min ; kvankam 38-jara, ŝi ŝajnis maljunulino.

Pafoj eksonegis kaj bojadoj.

« — Kio okazas ?

— Estas la doganistoj, kiuj postkuras la kontrabandistojn ; ni estas tute proksime de Hispanujo ».

Kiel eble plej multe ŝi malpliigis la lumon de la lampo kaj genuante sur la teran plankon, ŝi fervore preĝis. Estis sinistre kaj angore !

Kion mi faris en tiu farmo ? De kio kaj de kiu mi estis la komplico ? ĉu Bernard Sala revenos ? ĉu mi retrovos mian aŭtomobilon ? Pro laceco mi prostaciis dum mi ne scias kiom da tempo. Subite la pordo malfermiĝis kaj mi vidis 5 virojn, kiuj eniris en remizon ; la virino kuris al ili. Baldaŭ ŝi revenis kun feliĉa vizaĝo « Dio estu laŭdata ! ŝi diris, ili ĉiuj revenis ». Mi konkludis ke, kelkfoje ne ĉiuj revenis, kiam la pafoj de la doganistoj estis atingintaj sian celon. Sendube, hodiaŭ, ŝia edzo ankoraŭ unufoje revenis.

Bernard Sala, kun trankvila vizaĝo venis al mi.

— Ĉu vi bone ripozis ? ĉu ĉio iras bone ? Ni devas foriri. Via taksio atendas nin en la sama loko ; mi kontrolis.

Ni rapide malsupreniris ĝis la veturilo.

Ni denove veturis sur bona strato. Bernard Sala kantetis.

— Nu, sinjorino, ĉu la vojaĝo plaĉis al vi ?

— Jes, vere, sed kial vi elektis min ? Kial elekti virinon, por tia ekspedicio ?

— Estas nur hazardo ! vi plaĉis al mi, tuj kiam mi vidis vin. Mi bezonis iun, kiun mi povis fidi, kompreneble. Mi decidiĝis sen hezito post nia unua manĝo.

— Ankaŭ mi fidis je vi.

Ni tagmanĝis kune por la lasta fojo ; li riĉe pagis min. Li estis prepariginta mian aŭtomobilon por mia longa reira vojaĝo.

« — Mi tre dankas vin ; vi multe helpis al mi. Sed mi petas vin, forgesu ĉion, eĉ Bernard Sala, kiu ne estas mia vera nomo. Bonan reiron ! »

Ĉu kontrabandisto ? Tio ne estis mia afero.

INCENDIO

SKEĈO DE BUKAR

Dekoracio

Laborĉambro de asekuristo ; unu pordo, unu fenestro.

Labortablo, seĝoj, dosierošrankoj, ktp. ; ĉe la fono, impona monšranko.

Sur la muroj, afiŝoj kun sloganoj :

— HOMO KUN ASEKURO, HOMO KUN SEKURO.
— ASEKURITA DOMO, TRANKVILA DORMO.
— NE FORGESU ASEKURON, FORGESU ZORGON. (ktp.)

Ankaŭ kelkaj reklam-afiŝoj de asekurkompanioj.

Roluloj

Sinjoro ZILKO : asekuristo.
Fraŭlino DLUNA : asekuritino.

(Kiam la kurteno leviĝas, S-ro Zilko sidas ĉe la labortablo ; F-ino Dluna staras fronte al li ; ŝi aspektas tre kolera).

Dluna — Estas friponaĵo ! Asekuro estas friponaĵo ! ĉiuj asekuristoj estas friponoj, kaj vi, sinjoro Zilko, estas la plej granda fripono el ĉiuj tiuj friponoj !

Zilko (tre trankvila) — Fraŭlino Dluna, vi grave insultis min...

Dluna — ...kaj mi daŭre insultos vin !

Zilko — Mi rajtus peti riparon.

Dluna — La riparon vi atendadus dum longa tempo !

Zilko — Mi senkulpigas vin, Fraŭlino Dluna ; mi komprenas vian ekscitecon.

Dluna — Pro malpli iu ajn ekscitiĝus ! Mia apartamento forbrulis, mi perdis ĉion, absolute ĉion, kion mi posedis : mian meblaron, mian vestaron, mian monon, miajn juvelojn, miajn valorpaperojn, miajn memoraĵojn... mian hejmon ! Kaj vi, sinjoro Zilko, mia asekuristo, rifuzas pagi al mi mon-kompenson !

Mi ĉiam regule pagis la asekur-kotizojn ; sinistro okazas, vi rifuzas pagi ; ĉu mi ne rajtas nomi tion friponaĵo ?

Zilko — Fraŭlino, unue, mi ne rifuzas pagi ; mi proponis al vi...

Dluna — Ho, jes ! Vi proponis al mi kompromisan pagon... ridindan sumon : eĉ ne la dekono de mia perdo !

Mi ne petas almozon !

Zilko — Fraŭlino, bonvolu trankviliĝi, kaj sidiĝi : mi klarigos.

Dluna — Kial klarigi ? Mi ne venis por klarigo, mi venis por mono ; pagu mian perdon, aŭ mi vizitos advokaton !

Zilko — Jes ! Vizitu advokaton ! Li konsilos al vi asigni la kompanion ; tion faru ! Vi perdos vian proceson !

Dluna — Kial mi perdus mian proceson ?

Zilko — Pro apliko de la klaŭzo 56-a !

Dluna — La klaŭzo... kiu klaŭzo ?

Zilko — La klaŭzo 56-a ; vi ne konas la klaŭzon 56-an de via asekur-poliso, ĉu ?

Dluna — Ha ! Devas esti unu el tiuj klaŭzetoj presitaj per etaj literoj, kiujn neniu legas subskribonte la polison.

Zilko — Ĝi estas presita per normalaj literoj, kiel la resto de l'poliso. Sed neniu legas asekur-polisojn, kaj poste, oni plendas, kaj diradas, ke asekuristoj estas friponoj.

Dluna — Neniu legas asekur-polisojn, ĉar ili estas redaktitaj per fakaj vortoj, nekompreneblaj de ordinaraj homoj.

Zilko — Mi legos al vi la klaŭzon 56-an, kaj vi povos juĝi, ke iu ajn homo povas ĝin kompreni : (legas).

« En kazo de incendio, la asekurito devas « fari ĉion eblan por limigi la konsekvencojn de « la sinistro, tio estas : a) lukti kontraŭ la in« cendio, b) protekti la valoraĵojn ».

(Oni aŭdas pin-pon-hupon de alproksimiĝanta fajro-veturilo).

Zilko — Klara teksto, ĉu ne ? Nu, kiam ekbrulis via domo, vi tuj teruriĝis ; ne nur vi ne luktis kontraŭ la incendio — fakte, ĉu vi havis estingatoron ? laŭ la poliso, vi devis havi unu — sed vi elkuris el via apartamento, lasante en ĝi vian monon, viajn valoraĵojn, kvankam vi ja havis sufiĉe da tempo por ilin preni kaj kunporti, ĉar la incendio komenciĝis en la teretaĝo, kaj vi loĝas sur la tria etaĝo ! Ne momente disvastiĝis la fajro !

Dluna — Sinjoro Zilko, ĉu vi iam troviĝis en bruleganta domo ?

(Oni aŭdas fajfojn kaj policanon, kiu kriadas : « Vojon ! Vojon ! » ; kreskas la sono de la pin-pon-hupo).

Zilko — Nu.. neniam, feliĉe.

Dluna — Do, vi ne povas scii, kion oni sentas, kiam homoj kriegas, kiam odoras brulado, kiam kraketas la incendio, kiam kreskas la varmo, kvazaŭ vi starus sur la infero. Tiam oni pensas nur savi sian haŭton !

Eble pro tio mi kulpas. Mankas grava klaŭzo en la poliso : « En kazo de incendio, la asekurito devas resti « en sia domo, kaj forbruli kun ĝi » ! Tiel la kompanio ne estus devigata pagi mon-kompensojn al siaj asekuritoj !

Zilko — Fraŭlino, ne estas afero ŝercinda...

Dluna — Mi ne ŝercas ! Mi perdis ĉiujn miajn posedaĵojn, ne plu restas al mi io ajn, krom la robo, kiun mi surhavis tiam ; mi estas senhava, senhejma, kvazaŭ trampo ; feliĉe, amikino min gastigas ; alie, mi loĝus sub ponto. Kaj, por mortigi la mortinton, vi rifuzas pagi, kion vi **devas** pagi. Do, kredu min, Sinjoro, mia spirito tute ne turnas sin al ŝerco.

(La pin-pon-hupo aŭdiĝas tre proksime).

Dluna — Sed... kio okazas ? ĉu vi ne aŭdas ? Pin-pon, pin-pon ! Fajro-veturilo !

(La pin-pon-hupo subite ĉesas ; oni aŭdas rumoron en la apuda strato).

Zilko — Ne maltrankviliĝu, Fraŭlino ! Verŝajne nenio grava...

Dluna — Nenio grava ! Estas incendio !

Zilko — Vidu, kiel facile vi perdas vian memregon aŭdante hupon de fajro-veturilo ! Ne nur pro incendioj oni vokas la fajro-brigadon ; ankaŭ pro asfiksioj, elektrumoj, kor-atakoj... sed plej ofte pro bagateloj : la lastan semajnon maljuna vidvino vokis ĝin por... (ridetas) rekapti ŝian katon, kiu estis grimpinta sur arbo, kaj ne scipovis malsupreniri !

(Oni aŭdas pin-pon-hupon de dua fajro-veturilo).

Dluna — Aŭskultu ! Alvenas dua fajro-veturilo ! Mi dubas, ke oni bezonus du fajro-veturilojn nur por kapti katon sur arbo... (ŝi paŝas al la fenestro).

Zilko — Trejnado, verŝajne ; tre ofte la fajristoj faras ekzercojn...

Dluna (ĉe la fenestro) — Tiam, estas praktika ekzercado : la butiko, malsupre, brulas !

Zilko (subite ekscitiĝas, stariĝas kaj kuras al la fenestro) — Kio ? (rigardas eksteren) Ha ! Katastrofo ! La domo brulas ! Mia domo brulas ! (li kuras al la pordo) Venu ; Ne estas tempo por perdi ! Ni ne pereu !

Dluna — Ha ! Ne, Sinjoro ! Unue, ni devas protekti viajn valorajojn (ŝi montras ĉirkaŭ si).

Zilko (hezitas, kaj revenas) — Vi pravas ! (li ekscite metas dosierojn en la monŝrankon, kiu tre baldaŭ estas plenplena). Nur tion mi povas protekti ! Ni foriru !

Dluna — Tute ne ! Ni paku la reston por ĝin forporti ; mi vin helpos (ambaŭ pakas, ŝi tre trankvile, li tre nervoze). Tiuj dosieroj estas tre gravaj : la polisoj de viaj klientoj ! Vi ne povas riski perdi ilin ! ĉu pri tio vi ne pensis ? (ŝi paŝas al la fenestro kaj rigardas eksteren). Nun brulas la unua etaĝo ; eble la dua, mi ne bone vidas pro la balkono ; ni estas sur la kvara etaĝo, ĉu ne ?

Zilko — J...es !

Dluna — Ni ankoraŭ havas tempon ; kie estas via estingatoro ?

Zilko — Mia... ?

Dluna — Ha ! Ne diru al mi, ke vi ne havas estingatoron !

Zilko — Nu, mi ĉiam intencis aĉeti unu, sed...

Dluna — Vi ne havas estingatoron ! Jen grava nesingardo je via flanko ! ĉu vi neniam legis la klaŭzojn de via asekur-poliso ?

Zilko — Ni ne zorgu pri la klaŭzoj de la poliso ! Mi ne intencas morti en incendio ! Venu ! (li prenas pakojn kaj kuras al la pordo ; Dluna restas ĉe la fenestro kaj krucas la brakojn).

Dluna — Mi kredas, ke nun brulas la tria etaĝo.

Zilko — Kaj ni estas sur la kvara ! Venu ! Venu ! Prenu pakojn kaj venu !

Dluna — Ne teruriĝu, Sinjoro ! Preferinde observu la bravajn fajristojn, kiuj efike luktas kontraŭ la incendio ! Ha ! Jen admirinda spektaklo ; tiuj viroj ja estas kuraĝaj ! Veraj virviroj !

Zilko — Sed ĉu vi ne sentas la varmon tra la planko ?

Dluna — Je tia vintra vetero ne estas malagrable...

Zilko — Se vi ne volas foriri, mi sole foriros !

Dluna — Kaj ĉi tie vi lasus min, malfortan virineton ? Vi ne estas kavalira !

(Zilko kuras al Dluna, prenas ŝian manon, kaj tiras ŝin, sed ŝi liberigas sin).

Dluna — Ha ! Sinjoro ! Konservu vian memregon !

Kaj vidu : bonege laboris la fajro-brigado ; jam la incendio malpliiĝas ; ne plu estas danĝero !

Zilko (malaplombe iras al la fenestro, kaj rigardas eksteren) — ĉu vi certas ?

Dluna — Jes ja ! La fumo malaperis, kaj oni ne plu sentas la varmon tra la planko.

Zilko (viŝas sian frunton).

Dluna — ĉu vi volas, ke mi helpu vin reordigi viajn dosierojn ?

Zilko — Ne ! Mi mem faros tion poste.


Dluna — Poste... post kio ?

Zilko (sidiĝas kaj plenskribante ĉekon) — Unue, mi pagos vian sinistron !

POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

Krucvortoj



⁂

NOVAJ PROBLEMOJ

(proponitaj de S-ro Salasc)

Anagramoj

El la 4 vortoj konsistantaj el 5 literoj, similaj, sed malsame vicigitaj, trovu ĉiujn vortojn, helpe de la jenaj difinoj :

A) Seksa karaktero de substantivo.

B) Gramenacaj semoj panigeblaj.

C) Loĝanto en centra afriko.

D) Nacio, lando, potenco.

Same, sed kun 2 sesliteraj vortoj :

A) Diablo.

B) Malgranda korniko.

A) Hispanrasa ŝafo.

B) Longa, mallarĝa leda strio.

Ŝak-Enigmo

lasta TU DOJ MOR DA UR LI unua

KAJ HAR LA BAR TU OL
EN POR ŜUL BO HAV AM
OJ U LA ĈI BO IĜ
AL DA EDZ SK MO AS
IĜ EN NON PLI U NA

Jen du proverboj. La solvo estas trovebla laŭ la movoj de la ĉevalo sur la ŝak-tabulo.

Dispecigitaj vortoj

Rekudrante ĉi-tiujn 14 vortetojn, vi restarigos sesvortan frazon, kiu estas Zamenhofa proverbo.

AS — CE — ĈE — CIĜ — FLU — IS — KO — MEN — MO — NO — PRO — SEN — SO — SO.

Enigmoj

El trisilaba vorto signifanta A... forprenu la mezan silabon, vi havos B...

1) A : Okcido de bario. B : Malagrabla frapo.

2) A : Akvokoko. B : Mara algo.

3) A : Lukse vivanta riĉegulo. B : Aksingo.

4) A : Fotografilo. B : Birdokorta reĝo.

5) A : Bazaro. B : Diversforma ringo.

Forigitaj ĉefliteroj

La unua litero de ĉiu sekvanta vorto forestas. Ĝin trovu. Tiuj ĉefliteroj konsistigas proverbon : ukso - tato - ulo - urdo - nui - ano - aso - rao - ato - aso - tero - ulo - toso - uko - upro - relo - odo - uro - rido - ago - poso - alo - aro - ruko.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

PROPRAJ NOMOJ (2)

1) MAJUSKLO estas uzata

— **Ĉe nomo kaj antaŭnomo :** Ludoviko Zamenhof.

— Ĉe nomoj **historiaj** (Virgilo, Jupitero) **geografiaj** (Himalajo, Bulgario. Danubo) **ĉe titoloj** (UEA, Biblio, Ligo de Nacioj) **ĉe festoj** (Pasko, Novjaro).

— **Ĉe la adjektivoj kaj adverboj derivitaj :** Herakla laboro, Atenaj ruinaĵoj ; Sud-Ameriken vojaĝi.

2) PLURALO ĉe la propra nomo estas uzata por montri membrojn de familio : la Burbonoj, la Hohencolroj.

3) AKUZATIVON oni uzas tiamaniere :

[N] — post vokalo : renkonti Hugon^{e}; vojaĝo Nederlandon.

[ON] — post konsonanto : legi Shakespeare-on ; viziti Grezijonon (veziti Gresillon-on).


RIM : Monto Blanka, Maro Ruĝa estas diritaj nom-epitetoj. En tiu okazo estas preferinde postmeti la adjektivon (P.I.V.).



Kontrasto

Ho, Margenja, kiom bela vi estas ! Kiaj belaj vestoj ! Kiaj riĉaj juveloj ! kiaj blankaj manoj ! Certe, en la balo, vi estos Cindrulino transformita de la Feino. Via krono igos vin Princino de la Mil kaj Unu Noktoj !

Tamen, antaŭ ol foriri, ne forgesu porti eksteren la rubujon.



Misaĵo

Mi ne scias, kio okazas al fraŭlino Maria, mia najbarino ; ŝi pli kaj pli surdiĝas ; jam dufoje mi kriis al ŝi « Eniru ! »



Abstrakta arto

— Sinjoro Petro, mi estas Jako kaj jen mia fratino Maria. Ni certigas al vi, ke ne estas ni, kiuj fuŝfarbis la bildojn. Rigardu niajn manojn, ili estas tute puraj !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (66 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux. BARCHON, Lg. (120 fr.).

Britujo : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (140 p.).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (20 kr.).

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (13 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (9,3 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (170 pes.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Affieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532.

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (900 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (48 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk. 209721 (9 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (18 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (13 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (11 fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (4 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (4 dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (18 respk.),



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 3 de 1974, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Dans le dernier « Entre Nous » je posais la question : « que donneront juillet et août ? » Nous ne pouvons pas répondre encore de manière certaine. Les inscriptions continuent à arriver à un rythme ralenti. Pour l'instant le bilan est assez décevant, la participation se situant au-dessous du nombre de l'an dernier. Que sera-t-elle en réalité ? La réponse viendra en septembre.

De toute façon il nous faudra étudier ce problème dès octobre et revoir peut-être notre mode de publicité ou le contenu de nos stages, encore que je ne pense pas que ce contenu ait une grosse influence sur la participation. On aurait pu penser qu'à une époque où les organisations espérantistes se sont fixé comme but à atteindre l'introduction de l'étude de l'espéranto dans les programmes scolaires, il serait bon dès maintenant de s'engager dans la première étape, la formation des maîtres. Il semble que les cours conçus pour aider à cette formation ne rencontrent que peu de succès. Les spécialistes de l'enseignement des lettres, des sciences, des langues vivantes, etc... n'hésitent pas à se recycler. Ceux qui enseignent l'espéranto n'en éprouveraient-ils pas le besoin ? Même si, en juillet, il y a peu d'intéressés, nous renouvellerons sans doute l'expérience à Pâques 1975. Pensez dès maintenant à cette date. Pensez à ce qui arriverait si ce que nous appelons de tous nos vœux, l'introduction de l'espéranto dans les programmes d'examens, nous était accordé. Nous aurions des élèves. Mais les professeurs acceptés par le ministère de l'Education Nationale ?

Pour remplir sa mission envers l'espéranto et les espérantistes, Grésillon doit avoir une aisance financière encore plus grande. Je rappelle à tous les amis que, en dehors des périodes de stages, le château peut être ouvert à des groupes pour des passages ou des stages. En avril, mai, juin et septembre et même jusqu'au milieu d'octobre nous recevons des groupements espérantistes ou amis qui désirent organiser des réunions de travail dans un cadre calme et agréable ou tout simplement visiter la région. Nous les aidons, lorsqu'ils le désirent, à organiser leurs excursions. Vous appartenez peut-être à un groupement, une amicale, une société qui de temps à autre organise une « sortie ». Grésillon est un centre privilégié de ce point de vue vous le savez. Alors contactez-nous. Dites à vos amis de nous contacter. De ce supplément d'activité bénéficieront tous les visiteurs de Grésillon.

P. BABIN.

Nos joies

M. Turbellier connu pour son activité espérantiste, surtout dans le milieu cheminot, nous fait part du mariage de son fils Christian. Félicitations à nos amis Turbellier. Tous nos vœux à Christian et à sa jeune épouse.

Nos peines

Nous avons le regret d'annoncer à tous les amis de Grésillon, et plus particulièrement à ceux des tout premiers jours, le décès de M. Fouski, d'Angers. Nous adressons à Mme Fouski nos bien sincères condoléances.

Mme de Briay, ardente espérantiste et amie de Grésillon, est décédée à Angers. Que sa famille veuille bien accepter nos sincères condoléances.

La revue

Les abonnements arrivent très régulièrement. Mais un certain nombre d'amis n'ont pas encore réglé le leur. Nous leur demandons de le faire vite... avant d'oublier. Les abonnements nouveaux sont assez nombreux. Mais il en faudrait encore beaucoup plus pour faire de la revue ce que nous voulons qu'elle soit vraiment. Alors, faites un effort auprès de vos amis et de vos correspondants. Merci d'avance.

Abonnements bienfaiteurs (suite)

D. Bourgeois (Suisse)	30,00	G. Brousse (75)	20,00	R. Bruguier (30)	30,00
B. Clavier (69)	20,00	J. Lezan (84)	20,00	R. Laffargue (33)	20,00
E. Noël (76)	20,00	M. Le Marquand (22)	20,00	R. Buerick (62)	20,00
J. Gallet (38)	20,00	G.-I. Martinez (16)	20,00	M.-L. Romagny (69)	20,00
A. Dumarquez (62)	20,00	P. Turbellier (44)	20,00	G. Masse (73)	20,00
A. Stutzmann (68)	20,00	A. Boyet (49)	20,00	R. Hubert (49)	20,00
J. Benistant (72)	20,00	A. Hervouet (92)	20,00	H. Habermehl (67)	20,00
Club des retraités (72)	20,00	U. Rasmussen (Danemark)	20,00	L. Belliard (44)	20,00
G. Eyssautier (69)	20,00	A. Naude (02)	20,00	S. Pelletier (49)	20,00
J. Carré (69)	20,00	M. Sol (33)	20,00	R. Melo (37)	20,00
L. Bossuet (33)	20,00	E. Gaudry (92)	20,00	R. Slot (Pays-Bas)	20,00
J. Schrapp (All. Féd.)	20,00	G. Bracquemond (63)	20,00	R. Cnudde (59)	20,00
G. Prevot (44)	20,00	J. Charlet (69)	40,00	R. Oliveaux (44)	20,00
D. Adnadj (Yougos.)	20,00	J. Salasc (34)	50,00	G. Chaumereuil (93)	20,00
P. Laurent (16)	20,00	M. Bavay-Gilliard (59)	20,00	M. Tricaze (64)	20,00
M. Cuvelier-Delassus (59)	20,00	A. Lherbier (72)	20,00	H. Tietti (Finlande)	20,00
R. Martin (35)	60,00	F. Jelenc (86)	20,00	G. Vandelli (Italie)	20,00
L. Goude (49)	20,00	P. Jelenc (U.S.A.)	20,00	M. Sueur (62)	20,00
S. Reyneau (49)	20,00	M. Herbet (62)	20,00	L. Gracia (66)	20,00
M. Ligot (22)	20,00	G. Hebert (76)	20,00	M. Suchareau (75)	20,00
Sro Gucz (Pologne)	20,00	C. Moreau (06)	20,00	J.-L. Saudian-Rousseau (95)	20,00
J. Decobert (59)	20,00	A. Bois (35)	20,00	P. Esteban (83)	20,00
M.-T. Loancy (Tunisie)	20,00	C.-J. Coppens (Pays-Bas) ..	25,00	A. Raulet (44)	20,00
H. Van Roye (Belgique)	20,00	J. Matzinger (67)	20,00	M. Boyer (80)	20,00
M. Igigabel (53)	20,00	M. Bergerot (88)	20,00	M. Boulay (72)	20,00
A. Fauvel (22)	20,00	F. Lanz (93)	20,00	G. Offroy (57)	20,00
R. Despiney (94)	20,00	F. Schurad (All. Féd.)	30,00	R. Doury (93)	50,00
G. Fourcade (45)	20,00	A. Kristos (63)	20,00	E. Schertzer (67)	20,00
C. Caniot (79)	20,00	B. Clavier (69)	35,00	J. Rocca (69)	20,00
A. Bourry (18)	20,00	J. Rival (42)	20,00	J. Blok (Pays-Bas)	25.00
P. Chevalier (44)	20,00	M. Stuit (62)	20,00	H. Journet (21)	20.00
Centre Esperanto Marseille (13)	20,00	R. Davoust (53)	20.00	E. Mace (76)	20.00
Sro Mac Lennan (Grande-Bret.	20.00	C. Tulasne (49)	20.00	R. Dumoulin (37)	20.00
B. Cheverry (49)	20,00	R. Kubler (68)	25,00	A. Marbœuf (49)	20.00
M. Bossard (44)	20,00	C. Lefebvre (72)	20,00	P. Laboutière (71)	20.00
A. Chagnoux (03)	20,00	G. Martin (69)	20.00	J.-P. Cousin (92)	20.00
F. Crepel (35)	20,00	M. Ferrut (25)	20.00	J. Bailly (89)	20.00
L. Bidet (03)	20.00	R. Quillaud (44)	20.00	M. Diard (49)	20.00
M. Tailpied (14)	20,00	G. Gerrier (75)	20,00	**TOTAL**	**2500,00**

Assemblée Générale du 7 Avril 1974

A 10 heures, l'Assemblée générale se réunit et les présents élisent à l'unanimité M. Jelenc président de séance.

Se sont excusés : Mme Micard, Mlle Vazon, Mme Mathé, MM. Chevalier, Benazet, Coussé, Guillaume, Guillot J.-P., Le Magadure, Bénistant, Thierry.

M. Babin annonce le décès de Mlle Blanche Vazon, qui a été une animatrice dévouée de la Maison pendant de très nombreuses années. Les membres présents, peinés de cette nouvelle, font part de leur sympathie à Mlle Jeanne Vazon.

Sur 356 sociétaires, 220 sont présents ou représentés, ce qui correspond à un capital de 58.400 F.

I. — RAPPORT FINANCIER

Il est présenté par M. Babin, président de la

M.C.E., en l'absence du trésorier, M. Chevalier.

Recettes :

— Le stock est en augmentation de 7.000 F., ce qui correspond à un renouvellement de librairie, à l'achat de bibelots et de cartes postales.

— Les dons, en nette progression, correspondent à l'aide financière de l'Association Culturelle.

— Les rentrées-séjours ont diminué de 1,8 M., car le stage de Pâques a été peu fréquenté et les passages d'écoliers n'existent plus puisque les voyages scolaires ne sont plus admis pendant l'année scolaire. Le stage de juillet a été moins important, mais l'année précédante il avait été exceptionnel.

— La vente des tickets est en baisse, car il semble que les stagiaires boivent moins de vin que par le passé.

— Par contre, les recettes de librairie sont à peu près identiques grâce au service régulier tenu toute l'année par M. Ciret.

— Le cours par correspondance est en légère augmentation.

Dépenses :

— En alimentation, elles ont diminué proportionnellement davantage que les recettes, car l'utilisation d'un congélateur permet de faire des commandes plus importantes et d'obtenir des tarifs préférentiels.

— Les dépenses de chauffage et d'électricité sont en légère baisse.

— Le blanchissage fait sur place permet quelques économies.

— Par contre, les salaires et charges sociales ont augmenté en fonction de l'évolution du S.M.I.C.

— L'augmentation du stock explique le plus gros chiffre dans la rubrique librairie.

II. — BILAN DE L'EXERCICE 1973

M. Babin continue à présenter et commenter les différents chiffres. Les disponibilités sont inférieures à l'année précédente car elles ont été en partie utilisées pour des travaux d'aménagement de chambres et de la salle de réunion.

De nouvelles actions ont été enregistrées pour une somme de 3.400 F. et d'anciennes ont été remboursées pour une somme de 4.400 F.

Les actions des personnes décédées et dont les héritiers n'ont pas fait connaître leurs intentions seront désormais versées sur un compte spécial d'attente.

L'Assemblée générale adopte le principe de rembourser un certain nombre de dettes à court terme chaque année afin d'éteindre cette rubrique en fonction des possibilités.

III. — CAPITAL SOCIAL

L'Assemblée générale enregistre l'adhésion de nouveaux sociétaires, ce qui porte le nombre total à 361 pour un capital de 81.700 F.

IV. — RESOLUTIONS

— L'Assemblée générale approuve le compte d'exploitation et adopte le bilan 1973 à l'unanimité.

— Les commissaires aux comptes donnent quitus au trésorier.

— Après examen du rapport d'activité, l'Assemblée générale l'adopte à l'unanimité.

— Renouvellement d'une moitié du Conseil d'administration :

Les six membres sortants sont à nouveau candidats. Ce sont : Mme Cheverry, MM. Babin, Chevalier, Ciret, Coussé, Guillot. Une nouvelle candidature est enregistrée, celle de Mme Vincent.

Etant donné que les candidatures sont plus nombreuses que les postes à pourvoir, l'élection à bulletin secret s'impose. Une discussion s'installe sur le mode de répartition des procurations en blanc. M. Babin demande à l'Assemblée générale de confier au Conseil d'administration le soin d'étudier et de proposer une réglementation concernant le vote par procuration. Cette demande est acceptée à l'unanimité.

Résultat du vote : sur 220 suffrages exprimés, ont obtenu : MM. Babin, 220 voix ; Chevalier, 220 voix ; Ciret, 220 voix ; Guillot, 220 voix ; Mme Cheverry, 218 voix ; M. Coussé, 217 voix ; Mme Vincent, 5 voix.

Les six premiers candidats sont proclamés élus. L'assemblée générale nomme MM. Berthelot et Prévot commissaires aux comptes pour l'année 1974.

V. — MISE AU POINT DES STAGES

M. Babin apporte des informations concernant les stages de 1974.

Pâques : Semaine culturelle organisée par U.F.E. pour les jeunes depuis 3 ans. Cette année, elle devait avoir lieu ailleurs, puis le stage a été à nouveau prévu à Grésillon. Il n'y a eu que 29 participants. Compte tenu du comportement de certains, il semble inopportun de renouveler l'expérience dans un avenir immédiat. Des execercices pratiques de pédagogie ont été très intéressant malgré le nombre restreint d'auditeurs.

Passages. — Stage prévu pour 87 étudiants italiens. Comme chaque année, différents passages et stages de courte durée se dérouleront avant l'été :

- 17-18-19-20 mai : stage Delaire.
- Pentecôte : rencontre habituelle des universités populaires.
- en septembre se réunira un groupe de cheminots.

ÉTÉ :

1er au 21 juillet. — Administration, M. et Mme Babin. Cours : Mlle Evelyne Le Magadure, M. Frédéric Le Magarure, M. Babin. Essais de pédagogie théorique et pratique. Reliure, M. Bénaïm ; vannerie, Mme Lenel ; émaux et paraboloïdes, M. Fargeon.

22 juillet - 10 août. — Thème général : l'homme et la machine. Administration, M. et Mme Guillot.

11 août au 1er septembre. — Administration, M. et Mme Dairon. Trois cours dirigés par MM. Bénistant, Friedlander, Ribot. Pour les activités annexes, les moniteurs ne sont pas encore connus.

VI. — QUESTIONS DIVERSES

Devant l'augmentation galopante des prix, M. Babin propose une révision exceptionnelle des tarifs de 10 %.

Différents travaux ont été effectués, en particulier l'alimentation électrique du 2e étage. Certaines réparations de peintures et tapisseries ont été rendus nécessaires par ces travaux.

L'aménagement de la salle de conférences se poursuit, permettant son utilisation, bien que les finitions ne soient pas terminées.

L'amélioration des sanitaires pour les campeurs n'a pas pu être réalisée étant donné l'importance des travaux d'évacuation que cela nécessite.

Les tableaux des salles de cours sont rénovés.

Il reste un problème à régler avec nos voisins à propos du bornage des limites du chemin forestier qui longe le terrain du moto-cross.

Le comité qui apportait une aide financière régulière à M. Despeyroux a décidé de donner à la M.C.E. un reliquat de 600 F., et l'Assemblée générale lui adresse ses remerciements.

La séance est levée à 17 heures.

Le secrétaire de séance,
Guy DAIRON.

REUNION DU CONSEIL D'ADMINISTRATION

Tous les membres sortants du bureau sont réélus dans leurs anciennes fonctions : président, M. Babin ; vice-présidente, Mme Cheverry ; secrétaire, M. Guillot ; secrétaire-adjoint, M. Jelenc ; trésorier, M. Chevalier.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noires :	0,50 F.
couleur :	0,60 F.
Cuillères de collection : 9,00 et	12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	3,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Commandez-nous

LEXIQUE FONDAMENTAL

Esperanto - Français

de Léger

6,50 F., port compris

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
route de la Boulerie
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 15 Fr.

Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin
Prix : **10,00 Fr.**